

& Dirvoko de Hjalmar:

<Rekante 15 el 31 batoj por strofo, entute 248 paŝoj dum 3 minutoj. El praislanda tradukis Baldur Ragnarsson (Norda Prismo 4, 1957). Baladigis Martin Strid (2016) per nova rekantaĵo kaj modifo de funebra marŝo el svedlingva parto de Finnlando, "Hindriks sorgemarsch".>

(&Melodio:

<1,4:31> (/LaLaLaLa SiLa; TiiTire doTi; LaaLado TiiLa;La SiMi MiMi; LaaLaLa SiiLa;La TiiTiTi SolLaTildo; reerere doTi; LaTi dore;

(#Rekantaĵe: mi3mi reedodo Tire doTi; Laadodo TiiLaLa SiMi MiiFiSi Lado TiLa; mi3mi reedodo Tire doTi i)

)×8)+

(&Strofoj:

<Oddur diras:>

'1 Kio al vi, Hjalmar? ; Haŭto mortpalas, ; certe febligas ; vin lezaj vundoj; kasko fenditas ; kaj dura kiraso; vidas mi vivon ; vin forlasi.

(×: **Iris ili batali brave ; Hjalmar kuraĝa kaj Orvar-Oddur vikingojn venkis ; Iris ili batali brave.**)

<Hjalmar diras:>

'2 Dekses vundojn ; kaj veston taŭzitan ; mi havas, kaj vidon ; volvis nigreco; koron enkuris ; klingo glava, ; akra rapiro ; pinte venena.

'3 Kvin mi havis ; kulturkampojn, ; sed min tedis ; terlaboroj; nun mi kuŝas ; kontraŭ morto, ; vundita glave ; sur Griz-insulo.

'4 Trinkas en halo ; de l' hejmo patro ; bieron noblaj ; eskortuloj; lacigas viglajn ; virojn drinkado, ; sed min glavspuroj ; spasmes turmentas.

'5 Forlasis mi ; la lume belan, ; brilevestitan ; tronulinon. ; Veriĝos diroj ; drastaj ŝiaj, ; ke mi revenos ; post venko neniam.

'6 Forlasis mi ; allogajn kantojn ; de junulinoj ; pro luktoj armilaj; pene rapidis ; forvelante ; lastan fojon ; de amikoj miaj.

'7 Movu de mano ; ruĝan ringon, ; portu al larma ; filino de l' reĝo; knedos ŝian ; koron ĉagreno, ; ke ne mi venos ; denove Upsalon.

'8 Korvo grake ; de granda arbo ; flugas kaj aglo ; akompanas; al aglo alta ; mi donas propran ; predon kaj mian ; sangon salan.)